Ĉe aliaj bestospecioj la mankosindromo estas "funkcia", kiel ekz. dum antagonismo kontraŭ medikamentoj, aŭ kiam la galsuka fluado malhelpas la grassolveblan vitaminon. Antibiotikoj reduktas la sintezan agadon de la intesta flaŭro, kaj pro tio povas estigi mankoperturbojn. Eble la plej bone konata antagonisto de vit-K estas "kumarolo", troviĝanta en putriĝinta dolĉa trifolio.

## Konkludo

La bestomalsanoj ĉie regantaj en Afriko kune kun la malabundo kaj malproksimeco de bestkuracistoj kaj ties helpo en multaj tropikaj landoj, kondukas ofte al misuzo de ĥemoterapiado kaj trouzo de iuspecaj aliaj terapiaĵoj, taŭgaj aŭ netaŭgaj. Tio rezultigas vitaminmankon resp. nesufiĉon pro subpremo de la biosintezo. Do, ofte kulpas la nefakula uzado de sulfonamidoj kaj aliaj antibiotikaĵoj por estigi avitaminozojn.

Pripensante la kondiĉojn sub kiuj estas verŝajne, ke nesufiĉo aŭ manko povas okazi en tropikaj regionoj, kaj konsiderante la rilatojn inter la vitaminoj kaj aminoacidoj, oni povas konstati, ke ĉiam ekzistas la eblo de vitamina nesufiĉo. Estas tre dube (escepte eble okaze de vit-B12), ĉu nura suplementa vitamindonado tre helpos al la grega prospero sen atenti la ĝeneralajn nutraĵajn bezonojn. Avitaminozoj kaj aliaj mankomalsanoj, se trovitaj kaj diagnozitaj, devas esti rigardataj kiel grava indiko por urĝa bezono de detala kaj konscienca ekzameno de la bestobredaj metodoj sur la koncerna farmbieno.


## Adreso de la aŭtoro

*Prof. D-ro R. SACHS*
*Vor dem Brückentor 3*
*DE – 37269 Eschwege* / GERMANIO

<ISAESachs@aol.com>


## Priaŭtora informo

Post unujara stipendio ĉe la veterinara esplorad-instituto *Onderstepoort* / Sudafriko, la aŭtoro servis 3 jarojn kiel praktika veterinaro en la nordo de Namibio (bestobredado) kaj 3 jarojn en la sudo de la sama lando (ŝafbredado). Tie li alproprigis al si la bazojn por sekva laboro pri sovaĝaj bestoj en Orienta Afriko kaj la profesiajn antaŭkondiĉojn por posta scienca laboro pri tropikaj malsanoj.



# Homeopatio – uzebla ankaŭ ĉe bestoj

*Monika SCHMALSTIEG*

## Enkonduko

Unu el la sekretoj de la homeopatio estas: alrigardi la pacientan organismon entute, kaj frue ekkoni kiam ekzistas agadbezono. La homeopatio baziĝas ne nur sur la lukto kontraŭ simptomoj sed sur "tuteca terapio". Ĉiu reago de la korpo estas samtempa respondo al samtempa perturbo de la sistemo, kiu, se ne forigita, kondukas al sistema malsano. La reguligado de la ĝenata funkcio estas la funda celo de la homeopatio. Rilate al la eŭrop-unia postulo, apliki speciale en la nutraĵprodukta bestobredado alternativajn kuracmetodojn, la uzado de homeopatiaj preparaĵoj prezentas tiuspecan efikan alternativon.

## Multo estas pripensenda

Dum regula kontrolado de la bestoj, faksperta persono tuj rimarkas antaŭsignojn. Tio povas esti ofta kuŝado, ruĝiĝintaj mukozoj, maltrankvileco, malklara rigardo kaj multaj aliaj ŝanĝiĝoj for de la "normala teniĝo". Konsidere la ĝeneralan vetersituacion, ekz. malvarma, kruda kaj seka vento, dum nebula malvarmeta kaj malseka aero aŭ somersezono kun peze premanta fulmotondra aero, aŭ forta varmego kun treege klara ĉielo kaj brulanta suno, same kiel apartaj tenadkondiĉoj, oni povas trovi la plej taŭgan rimedon inter la abunda homeopatia elekteblo.

Oni ekzemple trovas nazkataron kun amara elfluaĵo kaj forta larmverŝado. Tio estas la sama bildo kiel la okul-reago al cepo (*Allium cepa*): dum ties tranĉado oni ja spertas similajn simptomojn. Tio en homeopatia kompreno signifas, ke eblas kuraci fojnfalĉ-rinitidon pere de la samsimptomkaŭza cepo: nome kun homeopata potenciĝo de "*Allium cepa* D 12". Oni ĝenerale uzas etajn sukeritajn globetojn, kiuj estis sekigitaj el la koncerna potencaĵo.

**Potencado de "prasubstanco"**

El la cepo oni gajnas pratinkturon, kaj tiu estos malkoncentrita, do fakte diluita (tamen homeopatie "potencita" laŭ la principo, ke malfortaj stimuloj instigas la vivofunkciojn kaj mezaj subtenas ilin, dum fortaj stimuloj povas inhibi kaj fortegaj stimuloj eĉ nuligi la kuracadan efikon).

D 1 estas la decimala "potenco" de la pratinkturo kun diluŝtupo 1:9. D 2 do egalas al la diluo de 1 parto de D 1 kun denove 9 partoj de la portanta fluidaĵo, kaj tiel plu. Krom tiu aparte bone konata D-potenco (t.e. decimala potenco), kiu reprezentas diluon 1:10, ekzistas ankaŭ C-potencoj kaj LM-potencoj. C staras por la latina "*centum*" kaj, pro tio, por potencadaj paŝoj kompare al 1:100. LM-potenco etiketas la latinnombran skribmanieron por 50 000, kaj do signifas potencadpaŝojn proporcie al 1:50 000. Ambaŭ, kaj C-potenco kaj LM-potenco estas "altpotencoj", kies apliko postulas kaj antaŭkondiĉas specialan homeopatian sperton kaj specialajn dozadojn.

Estas principe la virinoj, kiuj interesiĝas pri homeopatio. Tio estas bone komprenebla. Kiu bona patrino ne scias, ke jam la rigardo de ŝia infano indikas, ke tiu malsaniĝos postmorgaŭ? Tute ne temas pri speciala patrina "sepa senso" – sed ja pri ties bona observtalento kaj memorkapablo, ke la infano antaŭ du tagoj ludis ridante kaj nudpiede sur la malvarma planko en la vestiblo – kun malsekaj haroj post banado. La homeopatio aplikite je la ĝusta tempomomento kun la ĝuste elektita rimedo ofte protektas kontraŭ longdaŭraj suferoj. Oni pensu en tiu ĉi rilato ankaŭ pri elkuracitaj bestoj, ĉe kiuj pro rezistec-evoluado ne plu helpas alopatiaj, t.e. klasikmedicinaj kuraciloj, kiuj baziĝas sur la doktrino, laŭ kiu oni kuracas per la kontraŭaĵoj.

**Kontenteco de la besto**

Ankaŭ dum la kondutpsiĥologia terapio de hundoj kaj katoj eblas subtene apliki homeopation. Tamen oni ĉiam devas konsideri, ke dum homeopatia kuracado iu rimedo, kiu bone helpis al iu besto, ne necese montros ĉe alia besto la saman bonan efikon. En tia okazo necesas preciza analizo de la psiĥa kondiĉo de la paciento. Se la psiĥo kaj ankaŭ la bonstata teniĝo akordiĝas, la homeopatio rapide sukcesplenas. Psiĥologia subteno povas kontribui – same kiel por infano ankaŭ por hejmbesto – al pozitiva vivosinteno. Tion povas efektivigi tute simplaj paŝoj, kiel ekz. apliko de "amika" masaĝo aŭ dono de frandaĵo.



Okaze de kontenta besto estas rekoneblaj ras-tipaj esprimformoj. Se hundo tro humile kaj atentopreta kuŝas en angulo aŭ hirthare graŭlas, se ĉevalo kun oreloj striktaj sur la kapo dentomontras, se bovino okulrulas kaj provas faligi vin – nu, tio estas klaraj signoj de malkontenteco. Sed kiam atenta observanto jam dum melkado rimarkas, ke la bovina mamo dum la unua tuŝado subite streĉiĝas kaj varmegiĝas kaj tuj alvokas kuracan helpon, tiam eblas, ke per "celdirektita ekscito" estas stimulata la korpopropra reguliĝa kapablo. Tio evitas la aperon de pli gravaj sanoproblemoj.

**Ne konkurenco, sed kompletigo**

Gravas konstati, ke la homeopatio neniel rigardas sin "kontraŭpezo" al la universitatnivele instruita veterinarmedicino, sed kiel ties naturan partneron. Ĝi ne volas anstataŭi okaze necesan praktikveterinaran terapion, sed ĝi povas – subtene de salubra nutrado kaj prudenta vivokonduto ĉe niaj animalaj kunvivuloj – tiun sencoplene kompletigi.

En la veterinara medicino, la pacientoj neniel estas "influataj" de la kuracanto, de la kuracmaniero aŭ de la koloroj de medikamentoj, kaj sen influo al la psiĥo de la besta paciento montriĝas efiko aŭ neefiko de la aplikita kuracilo. Bestoj ne reagas al placeboj.

Naturterapiado ĉe bestoj fariĝas pli kaj pli populara. Sed nur malmultaj veterinaroj emas apliki tiuspecajn komplementajn eblecojn de homeoterapiaj agmanieroj kiel fitoterapio, psiĥoterapio, neŭroterapio, akupunkturo kaj aliaj homeopatiaj kuracmetodoj ĉe bestoj. Kiel kialon la ĝisostaj disĉiploj de la alopatia kuracado plej ofte argumentas, ke la nekonvenciaj metodoj ankoraŭ ne estas sufiĉe science eruditaj. Iom nekomprenebla eldiro – ĉar ankaŭ en la universitatnivele klerigitaj veterinaroj "ne ĉio estas oro, kio brilas", kiel ekz. la duba apliko de antibiotikoj ĉe virozoj.

Estus bone, se la antaŭdiritajn kuracsukcesojn – kiujn ja postulas la bestoposedantoj – ambaŭ, kaj la veterinaro kaj la naturpraktikanta bestkuracanto, al tiuj konigus kun la necesa honesteco, sincereco kaj diafaneco. Tio estas dezirinda fakte en la du naturkuracadaj branĉoj: la veterinara kaj homkuraca medicinoj.

La homeopatia kuracado postulas fundan bazoscion de la porbesta naturkuracanto kaj, antaŭ ĉio, la samtempan subtenan kunlaboron de

la bestoposedanto, por efike apliki helpon laŭ la homeopatia latinlingva gvidmotivo *similia similibus curentur*, nome ke "similo kuracu similon".

**Adreso de la aŭtoro**

*Monika* SCHMALSTIEG
*Hannoversche Strasse 156*
*DE – 31582 N i e n b u r g* / GERMANIO


<THP.Schmalstieg@web.de>

**Priaŭtora informo**

La aŭtorino estas naturkuracistino por bestoj (kun la specialaj fakoj: homeopatio por utilig- kaj hejmbestoj, fizioterapiistaj aplikoj, energetika masaĝo por ĉevaloj, lasera akupunkturo) kaj docentino ĉe la Germana Paracelso-Lernejoj. Ŝi ankaŭ estas fondomembro (kaj nuna estrarino ĉe la prezidantaro) de "Asocio de Germanaj Best-Homeopatoj (*ADF*)".

**Redaktora postrimarko**

Menciindas kadre de alternativaj naturkuracadoj ankaŭ la elektra magnetresonanc-stimula terapio (eMRS), kiu estas aplikata same influe ĉe bestoj kiel ĉe homoj. Fakte la reciproka efiko de elektra pulsa aŭ stata kurento kaj variado de magneta alternado estas pli ofte aplikata en veterinara ol en homkuraca medicino. Temas pri aplikiloj (bastonoj, kusenoj, matoj, tapiŝoj), malgrandaj por hundoj kaj katoj, kiuj ŝajne "sentas" la bonan efikon de eMRS kaj ofte libervole kuŝiĝas sur la aplikilo. La terapio estas aplikata i.a. kontraŭ artikaj afekcioj de la moviĝ-aparato, artrozo, hemostazo kaj malakcela vund-resaniĝo, muskolaj doloroj kaj malsanoj efikantaj al la aŭtonoma nervosistemo. Ĉe remaĉuloj aplikiĝas altaj kuracŝtupoj, tre efikaj ankaŭ sur



la laktado de bovinoj. Precipe ĉevaloj estas rigardataj plej sensivaj por eMRS: ekzistas raportoj pri bona efiko kontraŭ nervozeco de rajd-, turnir- kaj kurĉevaloj kun samtempa altigo de ties laborpovoj. Grandaj ĉevalmatoj ebligas tutkorpan terapion (vd. bildon) per pulsa elektromagneta kampo, kaj specialaj gamaŝoj estas uzataj por la kuracado de artikoj, tendenoj kaj ligamentoj. (*sa*)



## *Scienca eĥo veterinara*


**Oni jam vidis ĉevalojn vomaĉi...**

De kie venas tiu stranga dirmaniero, kvazaŭ proverba parolturno? Nu, ĝi esprimas la ekeston de preskaŭ neebla okazontaĵo aŭ, alivorte, ĝi substrekas la alvenon de tute neverŝajna evento. Ĉevaloj preskaŭ ne kapablas "regurgiti" (veterinara faktermino por "vomi"). Tio dependas, interalie, de la fakto, ke ĉevaloj disponas pri tre forta sfinktero fine de la ezofago elire en la stomakon. Pro tio, la vojo de nutraĵo el la stomako reen en la ezofagon estas jam antatomie tre komplika afero. Sekvas el tio, aliflanke, ke ĉevaloj forte inkliniĝas al kolikoj pro manko de senproblema regurgiteblo. Tamen, facile aŭ malfacile – oni jam vidis ĉevalojn vomaĉi. (2005-10-13)



**Hundaj kaj homaj vivojaroj**

Ĉu 1 homa vivojaro egalas al 7 hundaj vivojaroj? Ne tute. Ekzistas pluraj akcepteblaj formuloj de prikalkulado kaj taksado. Jen la plej realisma: la unua vivojaro de hundo egalas al 21 homaj vivojaroj. Ĉiu plua hundojaro egalas al 4 homjaroj. Do, se vi estas posedanto de 7-jaraĝa hundo, vi povas elkakuli 21+(6x4) = 45 jarojn laŭhomvive. Ĝi do estas en sia "plej bona aĝo". La kalkulo komparas 10-jara hundo al 57-jara homo, kaj 15-jaraĝa hundo al 77-jarulo. Tio certe estas pli proksime al la fakto ol kalkulo laŭ la "1=7"-metodo, kiu rezultigus 105 jarojn kompare al 77. Cetere, al via hundo tiu ĉi aŭ iu ajn alia vivjarkomparkalkulo estas tute seninteresa. ... (2005-04-07)



**Kuraĝa subakviĝisto**

Kiu estas la subakviĝ-rekordulo inter la mamuloj? Nek la kaĉaloto *Physeter catodon* (subordo *Mystacoceti*, familio de *Physeteridae*), nek la marelefanto *Mirounga leonina* (el la rostro-fokoj, familio de fokedoj *Phocidae*, subfamilio *Cystopturiinae*), sed la profundmara rekordulo estas la "nordmara anser-cetaco" *Hyperoodon ampullatus* (el la cetaca subordo de dentocetacoj *Odontoceti*, familio *Ziphiidae*), kiu mezuras ĝis 10 metrojn longa kaj pezas 7 tunojn. Kaj ĝi estas ĝis nun nur malmulte esplorita, ĉar ĝi